

Organ-donacado: nova iniciato savos vivojn



**Nova socio sen
malnovaj
stereotipoj**

Insulo malaperinta

**Malplenaj kapoj,
plenaj korpoj**

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Eldonjaro: 2005

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 270 paĝoj,

ISBN: 90-77066-18-07; prezo ĉe FEL: 20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Ĉu malriĉuloj riĉulojn subtenas?

9



La registaro de Nov-Zelando reduktas enspezim-postojn ekde la 1a de oktobro 2010, tiel ke la plimulto da homoj pagos ne pli ol 17,5 %. Tiuj, kiuj enspezas jare pli ol 70 000 novzelandajn dolarojn (ĉirkaŭ 38 000 eŭrojn), pagos 30 %.

Malplenaj kapoj, plenaj korpoj

16



Skuiĝis lastatempe pro diversaj skandaloj la mondo de sumoo, la japana tradicia lukto rigardata kiel nacia sporto. En 2007 mortis juna luktisto pro tiel nomata fava traktado, nome perfortado; en 2009 estis maldungitaj du rusaj luktistoj suspektataj pro haŝiŝo-fumado; kaj en 2010 la plej forta Jokozuma-luktisto Asaŝoorjuu estis eksigita pro perforto al konato dum drinkado.

Nekontentiga bilanco

19



En la jara raporto 2010 pri la Jarmilaj Evoluigaj Celoj (2000-2015), kiu estis prezentita en Vieno, oni notas, ke la klimatsanĝiĝo kaj ekonomia krizo grave malfaciligis ĝian plenumon. Estas prezentitaj iuj sukcesoj, tamen oni mencias ankaŭ la kaŭzojn por la manko de kontentiga progreso.

Al la Jarmilaj Celoj apartenas ankaŭ la certigo de natura media daŭripovo, por kiu kiel indikilojn oni konsideras la senarbarigon, la ellasojn de karbona dioksido kaj konservon de biodiverseco.

politiko

SVISLANDO	8
Respondo malprudenta	
NOV-ZELANDO	9
Ĉu malriĉuloj riĉulojn subtenas?	

moderna vivo

LITOVIO	10
Eklezia „ludo“ kondamnita	
ORGAN-DONACADO	10
Nova iniciato savos vivojn	
BELGIO	11
Ĉu viktimoj de justico?	
SPIONADO	12
Malsekretaj sekretoj	
EGALECO	12
Nova socio sen malnovaj stereotipoj	
MONDA VARMIGO	13
Insulo malaperinta	
OPINIO	14
Revo realigita	
JAPANIO	16
Malplenaj kapoj, plenaj korpoj	
TRAFIKO	17
Vojo de la Nacio	
SERBIO	17
Ponto al pliaj kontraktoj	

ekonomio

KONGO (D.R.)	18
Administrado pri turismo estas kripla	
AFRIKO	18
Stabila valuto gravas	
AFRIKO	18
Afrika komuna valuto	

medio

JARMILAJ EVOLUIGAJ CELOJ	19
Nekontentiga bilanco	

novelo

Turmentoj	21
-----------------	----

enigmoj

Enigmo: 3 en 1	23
----------------------	----

libroj

Perversa pedagogio - drameca didaktiko	24
Kiel aspektas miraklo	25

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

Se vi reabonas antaŭ la 1a de novembro 2010, vi rajtas pagi laŭ la malnova tarifo (vidu en antaŭa numero de MONATO).

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.
Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de
Britio, Esperanto House, Station Road, Bar-
laston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio.
Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafoicejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
► Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
► Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
► Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa
d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: wickler.albert@gmx.net
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry
Way, Long Bay, North Shore City 0630.
Reto: gddewar@ihug.co.nz
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- **Ruslandaj:**
► Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zcirić@eunet.yu
- **Slovenaj kaj Slovakaj:**
► Siŝnja Brankovič, Va Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
- Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: checkford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
► Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.
esperanto@telia.com.
- Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Retproblemoj

Ke Interreto alportis multajn utilajn uzeblojn, ne estas dubinde. Sed ĝi ankaŭ alportis problemojn kaj malavantaĝojn. Ekzemple, novaj esploroj montras, ke legantoj de tekstoj en la reto kutime ĉesas legi post nur kvinono de artikolo. Por komparo: legantoj de presitaj tekstoj interrompas plej frue post la duono. Evidente do la reto akcelas malemon legadi. Verkantoj tial reagas al tiu fenomeno, skribante tekstojn pli kaj pli mallongajn. Eble iam ili reduktos la enhavon al nur unu frazo. Modelo por tio ja estas la mallongaj mesaĝoj, kiujn oni povas skribi per poŝtelefonoj.

Akompanas tiun fenomenon uzado de telegramstila aŭ eĉ kripla lingvaĵo. Ankaŭ multaj aŭtoroj de nia revuo evidente opinias, ke oni tiel devas reagi al kreskanta mallegemo: ili liveras pli kaj pli mallongajn artikolojn (bonŝance ankoraŭ ne en kripla lingvo).

Alia malavantaĝo de la reto estas perdo de privata sfero. Pli kaj pli multaj homoj ne hezitas prezenti siajn intimajn aferojn publike en la reto. Tion tamen multaj homoj ankaŭ timas. Aktuala ekzemplo estas la servo Street View de Google. Neŭtrale oni povus traduki tion per „stratorigardo“, sed kritikantoj preferas la formon „stratogvato“ kaj protestas, se en tiu servo ili trovas sian propran straton kun sia hejmo.

Aparte ampleksaj estas protestoj en Germanio, kie Google planis komenci tiun servon en septembro. Jam en aŭgusto oni kalkulis pli ol 200 000 intervenojn de civitanoj. Laŭ enketo 52 elcentoj de la germanoj malakceptas prezentadon de siaj hejmoj per stratogvato. Tio ne mirigas, ĉar germanoj pro historiaj spertoj estas aparte sentemaj koncerne sian privatsferon. Dufoje dum la pasinta jarcento totalismaj sistemoj rigore spionadis

siajn civitanojn. Komence la nazioj per pluraj sekretaj servoj kaj policoj eks-termis ĉiun privatsferon kaj persekutis amase homojn, kiuj ne konformis al la nazia ideologio, kaj murdis miliojn. Poste orientgermanoj dum 40 jaroj suferis spionadon de komunistaj sekretaj servoj, precipe la fifama „Stasi“ (Staatssicherheitsdienst, servo por ŝtatsekureco). La problemoj ĉe Google estas, ke temas pri privata entrepreno, kies manipulado de datenoj estas ne-travidebla. Tial multaj homoj ne fidis al ties promesoj ne prezenti hejmojn de protestintoj. Nun la germana registaro planas apartan leĝon pri la afero. Ĉu tio solvos la problemojn, ne estas certe.

Sincere via

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendo ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzelangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklee 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzon oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-shi, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario.
Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu

viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Serco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzelangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Ŝatinda turisma lando

La valora artikolo (MONATO 2010/7, p. 14-18) de Vitalij kaj Anatolij Ionesov pri Mirzo Ulugbek memorigas al mi tre agrablan vojaĝon en Samarkandon: mi vizitis la monumentojn fotitajn en Monato, gvidate de Anatolij Ionesov, tute kompetenta ĉiĉerono. Uzbekio estas ŝatinda turisma lando.

Gaston RISTE
Francio

Kumamoto ne jubileu

En sia interesa artikolo pri Kumamoto (MONATO 2010/8-9, p. 20-21) sinjoro Harada skribas, ke la kastelo de Kumamoto festis la 400-jaran jubileon de sia ekzisto. Certe la kastelkonstruo finiĝis en 1610, kaj ni estas en 2010.

Tamen estas dirinde, ke la nuna kastelo ne estas tiu, kiu estis konstruita en la 17a jarcento. La originala

kastelo estis plejparte detruita en 1877 dum la enlanda milito konata kiel la ribelo de Satsuma. La nuna kastelo, kaj precipe ĝia ĉefturo, estis rekonstruita en 1960. Mankas do 83 jaroj por 400-jara ekzisto.

Multaj japanaj kasteloj malaperis, ĉu pro tertremoj, ĉu pro incendioj, ĉu pro militoj, inter kiuj estas la dua mondmilito, kiu sola detruis kvin el ili. Restas nur 12 originalaj kasteloj, kaj Kumamoto ne estas inter ili, la plej malnova estas tiu de Maruoka (1576) en la gubernio Fukui.

Thierry TAILHADES
Francio

Parado de toleremo

La „paradoj de toleremo“ (MONATO 2010/8-9, p. 12) laŭ mi reale estas „paradoj de maltrankviligo“. Malmultnombraj samseksemuloj maltrankvi-

ligas multnombrajn loĝantojn, manifestaciante sur stratoj. Seksemo ne estas por stratoj kaj paradoj. Jam estas seksemo objekto de difinitaj sciencoj, sociaj sistemoj kaj popolaj spertoj, kaj sur ili sin apogas la seksa edukado de junuloj ĉe ĉiuj popoloj. Tial mi opinias, ke estas erare aprobadi paradojn de samseksemuloj kaj maltrankviligi la loĝantojn.

Atanasije MARJANOVIĆ
Serbio

Tri regionoj: kelkaj precizigoj (3)

Belgio estas interesa lando kun siaj malfacilaĵoj pri religio, lingvo kaj disdono de la prospero. Ĝis nun la belgoj sukcesis solvi siajn problemojn sen sangoverŝo. Tio estas priflerinda. Tamen mi estas iomete ŝokita de la frazo de Ivo Durwael „oni povas kompreni la acidan sintenon de la flandroj, kiuj sentas sin melkitaj“ (MONATO 2010/8-9, p. 6). Li parolas nur pri la diferencoj inter la nordo kaj la sudo, sed ekzistas ankoraŭ pli grandaj diferencoj inter la okcidentaj kaj la orientaj provincoj de Belgio. La orienta provinco Limburgo estis ĉiam malbone traktata kompare al la okcidentaj kun iliaj grandaj urboj. Ili havas havenojn, la sudaj kaj orientaj provincoj ne. Similas iomete al Kroatio kaj ĝiaj najbaroj.

Ivo Durwael ne parolas pri la vera regado de la monfluo. Kelkaj familioj kaj profitgrupoj uzas la romantikan bildon de la maljuste traktata Flandrio por nun akiri la povon. Preskaŭ ĉiuj amaskomunikiloj en Flandrio estas en la manoj de tiu malgranda grupo. Ili uzas la lingvon por organizi la landon kaj per ĝi la disdonon de la prospero. Ili sukcese akiris pli da regado super la monfluo. La frapfrazo estas: kion Flandrio faras, tion ĝi faras pli bone ol Belgio. La mono por grandaj publikaj laboroj estas jam en iliaj manoj.

Lingvo – kiel religio aŭ haŭtkoloro – ne estas bona bazo por organizi landon. Pli bone estus, se la registaro okupus sin pri veraj problemoj de la homoj: la kvalito de la aero, akvo, nutraĵoj. Se oni koncentrus sin je la veraj problemoj, la respekto kaj la kunvivo inter la homoj havus pli da ebloj.

Eduard KUSTERS
Belgio

Monato
INTERVJUS MAGAZIN-SENDOPEND

Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponojn nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Ĉu kulpas nur la naturo?

Stefan MAUL

Meze de tiu ĉi jaro abundis katastrofoj en multaj landoj, plej multajn el ili kaŭzis la naturo, sed ankaŭ homa kulpo kreis aŭ fortigis iujn el ili. La naftokatastrofo antaŭ la orienta bordo de Usono tute klare estis homfarita. Kaŭzis ĝin eksplodo de borturo de la naftokompanio *British Petroleum* (BP, brita petrolo), kies sekvo estis detruo de bortruo en giganta profundo mara. Sekve dum multaj semajnoj milionoj da litroj da nafto senĉese elfluis el la grundo, poluis la akvon kaj damaĝis ne nur plantojn kaj bestojn en la maro mem, sed ankaŭ la bordojn. Bonŝance pro tiu akcidento mortis „nur” kelkaj homoj, tamen tre multaj bestoj (precipe fiŝoj kaj birdoj). Estis unu el la plej grandaj katastrofoj tiuspecaj, se ne la plej granda.

Sekvis diluvoj en Ĉinio, kiuj kaŭzis ne nur detruojn de kampoj, sed ankaŭ malsuprenglitadon de deklivoj, kiu „entombigis” tutajn vilaĝojn kun loĝantoj. Miloj da homoj mortis, miloj senhejmiĝis. Certe, kulpis abundaj pluvegoj, sed kulpis ankaŭ la fakto, ke en tre multaj riveroj de la regiono oni konstruis gigantajn akvobaraĵojn nesekurajn; pluraj rompiĝis pro troa akvamaso. Do ankaŭ tiu ĉi katastrofo estis almenaŭ parte homfarita.

Rekordaj temperaturoj

Unuavide la gigantaj incendioj en Rusio ne estis homfaritaj, sed ŝulditaj al la vetero. Pro ekstrema varmego plursemajna tie bruladis multegaj arbaroj kaj – precipe danĝere – torfejoj, kio terure poluis la atmosferon. Ne nur mortis multaj homoj en la fajroj, sed ankaŭ ege suferis ĉiuj loĝantoj pro la veneno, kiun alportis ventoj ĝis la ĉefurbo Moskvo. La incendioj detruis domojn en multaj regionoj, tiel ke ho-

moj perdis ĉiun havaĵon. La ekonomia damaĝo estis giganta, sed la homa sufero eĉ pli granda. Kial oni ne sukcesis rapide sufoki la brulojn? Ĉar mankis fajrobrigadistoj kaj aparatoj por batali kontraŭ la incendioj. Do ankaŭ tie kulpis homoj, precipe politikistoj, kiuj ne sufiĉe ekipis fajrobrigadojn, uzante la monon prefere por aliaj aferoj (aŭ por si mem?).

Paradokse samtempe estis malvarma vetero en Ĉeĥio, Pollando kaj la najbara Germanio, kie abundaj pluvegoj kaŭzis inundojn per riveroj. Subakviĝis multaj vilaĝoj kaj urbetoj, mortis kelkaj (malmultaj) homoj, la damaĝoj estis tamen ankaŭ tie grandaj. Parte mankis digoj por deteni akvon, aliaj rompiĝis pro akvopremo. Tamen en tiuj bone strukturitaj landoj oni relative bone mastris la problemojn, ankaŭ ne mankis helpiloj kaj helpantoj. Kaj damaĝitoj povis esperi pri ŝtata helpo por riparado kaj rekonstruado de domoj.

Biblia dimensio

La plej granda homa katastrofo tamen sendube okazis en Pakistano, kie diluvo kompareblis kun tiu, pri kiu raportas la juda Biblio. Senĉesaj pluvegoj kaŭzis neimageblajn inundojn, en kiuj pereis 1500 homoj kaj senhejmiĝis 20 milionoj. Evidente tio estis la plej terura naturkatastrofo de la nuna epoko. Kaj kontraste al la biblia rakonto, neniu el la trafitaj homoj disponis pri arkeo kiel Noa, kiun savis dio. La malriĉega popolo ne ricevis helpon de korupta kaj malkompetenta ŝtato, skuata krome de taliba terorismo. Blasfeme taliboj asertis, ke pri la katastrofo kulpas la fakto, ke la ŝtato ne estas islamisma. Sed nelaste pro la timo de okcidentaj homoj pri taliboj kaj terorismo helpo el tiuj landoj por la suferantaj pakistanoj komence alvenis nur tre hezite.

Klimatŝanĝo

Ĉu troveblas komuna faktoro de ĉiuj ĉi katastrofoj? Ĉu oni simple povas diri: kulpas la naturo? Jes, sed naturo torturita de la homaro. Klare ke en Rusio, Ĉinio, Pakistano kaj meza Eŭropo inundojn kaj incendiojn kaŭzis la naturo. Sed diluvoj kaj bruloj estis tiom terure gigantaj (rekordaj) nelaste pro la klimatŝanĝo kun pli kaj pli ekstremaj veteroj, kaj ke pri ĝi kulpas homoj, estas same klare.

En Rusio aldoniĝas kroma faktoro. Dum la komunisma epoko gigantomaniuloj regantaj tie ordonis senakvigi vastajn marĉojn. La restanta torfo nun estas tiom seka, ke ĝi brulas tiom pli facile. Sed la naftokatastrofo en Usono ne ŝuldiĝas al klimatŝanĝo. Tamen, se Usono, kiel preskaŭ ĉiuj aliaj landoj, fine agnoskus la ekziston de tiu ŝanĝo kaj eltirus konsekvencojn, ĝi devus rezigni pri nafto kaj akceli aliajn energifontojn. Pretekste oni diras, ke BP pro neglekto de preskriboj kaŭzis la akcidenton. Tial oni daŭrigas boradon en profunda maro. Sed eĉ plej pinta teknologio povas fiaski. Perfektaj metodoj ne ekzistas. Ni do povas atendi pliajn katastrofojn homfaritajn. ■



1/09/2010 - pro ekstrema varmego plursemajna en Rusio bruladis multegaj arbaroj kaj – precipe danĝere – torfejoj, kio terure poluis la atmosferon.

SVISLANDO

Respondo malprudenta

En somero 2008 Hannibal Kaddafi, la filo de la libia ŝtatestro, restadis en Ĝenevo. Tie lia edzino kaj li ŝajne frapis subulojn, kiuj plendis ĉe la polico. Do la ĝeneva polico devis ekagi.

Svisaj kantonoj estas ŝtatetoj. Ĝenevo estas eĉ „respubliko kaj kantono de Ĝenevo” (france *République et canton de Genève*). Tamen, ricevinte la plendon, la ĝenevaj aŭtoritatoj ekrilatis kun la departemento pri eksteraj aferoj de la tutsvisa registaro en Berno por informiĝi pri la farenda paŝo.

El Berno venis respondo: „Agu plej prudente!” (france: *Agissez avec la plus grande prudence!*). Ĉu sugesto, propono, konsilo, peto aŭ postulo, ne estas klare. Kio ja klaras, estas, ke la filo de ŝtatestro Kaddafi estis en hotelo kun sia graveda edzino. Ĉu do prudente, ke arestu la paron du policistoj sen uniformoj je la naŭa matene, aŭ 20 policistoj en uniformoj je la sesa matene?

Mankatenoj

La ĝeneva polico elektis la duan eblon, eĉ uzante mankatenojn por Hannibal Kaddafi. Tiu pasigis du noktojn en malliberejo. Dum tiu tempo oni fotis lin,

eĉ kiam li surhavis la mankatenojn. Plia mispaŝo: kunlaboranto de la polico donis, liveris, vendis – kiu scias? – la fotojn al la ĵurnalo *La Tribune de Genève*, kiu ilin aperigis.

Enketas nun tribunalo por trovi kaj puni la kulpulon en la polica servo. Intertempe Libio koleregis kontraŭ Svislando. Arestitaj estas du svisoj en Libio, kiuj fariĝis ostaĝoj. La unua revenis en februaro 2010, la dua en junio.

Tiu lasta estis akuzita pri kontraŭleĝa restado en Libio kaj punita per kvarmonata restado en malliberejo. Verŝajne kulpas pri la tuta afero malklara komunikado inter Berno kaj Ĝenevo.

Mireille GROSJEAN

DIMITRY VALBERG

Kontribuojn pri la politiko de via lando sendu al politiko@monato.net



Enketas nun tribunalo por trovi kaj puni la kulpulon en la polica servo.



La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, butiko@fel.esperanto.be aŭ www.retbutiko.net kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

Ĉu malriĉuloj riĉulojn subtenas?

La registaro de Nov-Zelando reduktas enspezimpostojn ekde la 1a de oktobro 2010, tiel ke la plimulto da homoj pagos ne pli ol 17,5 %. Tiuj, kiuj enspezas jare pli ol 70 000 novzelandajn dolarojn (ĉirkaŭ 38 000 eŭrojn), pagos 30 %.

En la elektokampanjo en oktobro 2008 la Nacia Partio promesis redukti impostojn. En la buĝeto de 2009 ĝi ne povis plenumi sian promeson pro la monda financa krizo. Tamen ĝi taksas, ke la ekonomio iompostiome resaniĝas kaj en la buĝeto de 2010 povas toleri signifajn ŝanĝojn pri la imposta sistemo.

Por pagi la redukon la registaro pligrandigas la imposton pri varoj kaj servoj (GST – speco de aldonvalora imposto) de 12,5 % al 15,0 %, plialtigas la jaran imposton pri veturiloj, la imposton pri tabako kaj kelkajn aliajn impostojn. Ĝi ankaŭ reduktas servojn.

Koalicio

Tial la opoziciaj partioj avertas, ke malriĉuloj pagos la impostajn reduktajn de riĉuloj. Ankaŭ la Maoria Partio, membro de la reganta koalicio, kontraŭas la pliigon de GST, sed voĉdonis por ĝi en la parlamento, ĉar ĝi ne volas ekŝiĝi el la registaro.

Sistemo por komercado pri ellasaĵoj (t.n. karbono-imposto) ekfunkciis en julio 2010. La ĉefministro, John Key [ĝon ki], taksas, ke tio aldonos 5 % al la kosto de benzino kaj elektro. La centra banko verŝajne pliigos la oficialan interezon.

La kosto de riparoj de likantaj domoj, konstruitaj dum la 1990aj jaroj pro malbonaj decidoj pri normoj de konstruado, aldoniĝos al naciaj kaj lokaj impostoj,

kaj pliigos la kosto por uzi trajnojn kaj busojn. Gepatroj pagos pli por edukado de etaj infanoj. Oni atendas, ke la pli altaj kosto de aliaj impostoj, varoj kaj servoj, lupagoj, energio ktp nuligos la gajnon pro la imposta redukto.

Inflacio

Redukto de enspezimpostoj pravigeblas, ĉar la elcento pagata de ĉiu civitano pliigis dum la jaroj pro inflacio. Antaŭaj reduktaj tion ne sufiĉe korektis. La registaro diras, ke ĝi provis trovi justan aron da ŝanĝoj, sed multaj homoj kredas, ke la ŝanĝoj malsukcesas.

La registaro esperas, ke la impostaj ŝanĝoj kuraĝigos ekonomian kreskadon. Tamen limigoj en klerigado kaj kuracado kondukos al efikoj, kies plibonigado en la estonteco pli kustos. La opozicio notis, ke la registaro prunteprenos multan monon por pagi la impostmalaltigon. Por kompanioj la registaro reduktas la enspezimposton de 30 % al

28 %. Ĝi ŝanĝis prioritatojn de ministrejoj por doni monon al favorataj projektoj anstataŭ al aliaj. Ekzemple ĝi prenis 3,3 milionojn da dolaroj el medioprotektado por konstrui novajn biciklajn vojetojn por turistoj. La ĉefministro taksis, ke la vojetoj kreos 500 novajn laborlokojn. Ĝis la mezo de 2010 la rezulto estas magera: la projekto kreis nur 70.

Lernejoj

Diversaj grupoj akuzas la registaron pri maldemokratiaj decidoj. Instruistoj kontraŭstaras la enkondukon de t.n. naciaj normoj por mezuri la atingojn de lernejoj. Ili plendas, ke neniu antaŭprovis la metodojn uzotajn. La registaro reduktis la subvenciojn por maljunuloj, kiuj bezonas enhejman helpon, kaj malpligrandigis subvenciojn por kuraci viktimojn de akcidentoj.

La registaro eksigis la regionan registaron de Canterbury, pretekstante, ke ĝi tro malrapide ekagis pri akvorajtoj por farmistoj kaj aliaj komercaj uzantoj. La eksigitaj akuzis, ke la registaro anstataŭigis ilin per oficistoj, kiuj pli favoras komercajn interesojn kaj ne tiujn de voĉdonintoj.

La registaro devigas la kunfandon de la 12 lokaj registaroj en la regiono de Aŭklando sen antaŭa demokratia konsiderado. Do estos interese vidi, ĉu la registaro plu perdos subtenon pro siaj diversaj ŝanĝoj.

D. E. ROGERS



La registaro de Nov-Zelando prenis 3,3 milionojn da dolaroj el medioprotektado por konstrui novajn biciklajn vojetojn por turistoj.

Eklezia „ludo” kondamnita



Algirdas Brazauskas

La 1an de julio Litovio adiaŭis sian unuan demokratie elektitan prezidanton post la denova sendependiĝo. Mortis 77-jaraĝa Algirdas Brazauskas, kiu estis la prezidanto inter 1993 kaj 1998 kaj ĉefministrio inter 2001 kaj 2006. Malgraŭ sia komunista pasinteco (en la tempo de Sovetio li estris la litovan komunistan partion), li tamen fariĝis unu el la plej ŝatataj politikistoj en Litovio.

Neniu atendis, ke lia morto estigos tiom da kontraŭaj emocioj. Sed okazis ĝuste tio, kiam romkatolika kardinalo decidis, ke sankta meso por la forpasinto estos celebrata en la katedralo de Vilnius sen la kadavro de la mortinto.

Duboj kaj diskutoj

Litovio estas katolika lando, kie religia tradicio tre gravas, des pli dum funebra ceremonio de eminenta persono. Tial la decido de la eklezio semis dubojn kaj diskutojn.

Leviĝis la demando, kial Brazauskas, kiu dum la liberiĝa periodo redonis la katedralon, tiaman bildgalerion, al la eklezio, ne bonvenas tie. Fakte, eĉ okaze de lia inaŭguro kiel prezidanto la eklezio

malpermesis al li uzi la ĉefpordon de la katedralo, insistante pri flanko pordo.

Dua edzino

Eble, argumentis la popolo, la eklezio malkontentis pri lia komunista pasinteco. Aŭ eble kulpis la fakto, ke li vivis kun sia dua edzino sen religia geedziĝo. Ne respondis la pastraro. Intertempe sian koleron esprimis la nuna prezidanto de Litovio, Dalia Grybauskaitė.

Tial okazis du funebraj mesoj – unu en Vilnius kaj alia en la urbo, kie Brazauskas plenkreskis. Pro tio rifuzis partopreni unu aŭ alian meson Grybauskaitė, dirante, ke ŝi ne volas partopreni ludon de eklezio kaj politikistoj. Post la funebra meso la ĉefepiskopo provis pacigi la popolon. Li klarigis, ke unu enteriga formo taŭgas por adiaŭi fervoran katolikon; dua iun, kiu famiĝis pro karitata aktivado; kaj tria, kiam oni konfidis nur al la mizerikordo de Dio.

LAST

Foto: La funebra ceremonio de la unua prezidanto de Litovio Algirdas Brazauskas okazis ne tiel, kiel esperis granda parto de la litovoj – sen la ĉerko en la ĉefa sanktejo de la lando.

Nova iniciato savos vivojn

En dek jaroj la kvanto de la homoj, kiuj atendas anstataŭan organon, konsiderinde kreskis en Belgio. La manko de organoj ŝuldiĝas al diversaj faktoroj: pro medicina progreso oni povas savi la vivon de pli da personoj per anstataŭigo de organo; la nombro de junaj homoj, kiuj forpasis pro akcidento kaj do povus disponigi junajn organojn, malpliigis; kaj la meza vivdaŭro kreskas, tiel ke mortintoj estas pli maljunaj kaj do povas liveri malpli da reuzeblaj korpopartoj.

Tamen la situacio estas relative favora en Belgio. Tie oni rajtas forpreni organon ĉe iu ajn mortinto, krom se tiu dumvive deklaris rifuzon, aŭ kiam familiano malaprobas. Tio ĉi okazas malpli ofte ol en najbaraj landoj, tamen oni provas ankoraŭ malkreskigi tiun nombron. Kiam oni registrigas sin dumvive kiel dononto, la familio ne plu povas tion malhelpi.

Tial en du komunumoj en Belgio, Lommel [lomel] kaj Hasselt [haselt], oni transdonas broŝuron, kune kun parola klarigo pri organ-donacado, al ĉiu civitano, kiu mendas novan legitimilon. Sekve la nombro de registritoj preskaŭ triobliĝis. Eble baldaŭ oni imitos tiun ĉi iniciaton tra la tuta lando.

Ivo DURWAELE

Ĉu viktimoj de justico?

Ankaŭ Belgio havas siajn problemojn pri seksaj misuzoj en la katolika eklezio. Tiu loka problemo fariĝis mondnovaĵo, kiam en la 24a de junio brusela esplorjuĝisto kun 50 esploroj invadis la ĉefepiskopejon en Mechelen [méhele].

Oni tuttage enŝlosis la naŭ ĉeestantajn episkopojn, sekvestris iliajn poŝtelefonojn, komputilojn kaj agendojn, forportis kamionojn da materialoj, kiel la tuta librotendaro, ĉiuj komputiloj de la dungitaro, arĥivaĵoj, traserĉis la loĝejon de la emerita ĉefepiskopo Danneels [danel] kaj la katedralon kaj eĉ boris truetojn en la ĉerkoj de 15 kardinaloj.

Fine oni sekvestris en Leuven [leŭve] 475 dosierojn de sendependa eklezia komisiono pri la esploroj de seksaj misuzoj de pastroj. Tiam eĉ Vatikano akre protestis.

Kaŝi faktojn

En la lastaj jardekoj ade diskoniĝis pli da sciigoj pri seksaj misuzoj en la katolika eklezio. Feliĉe la ĉi-rilata pensmaniero iom post iom ŝanĝiĝis. Multaj civitanoj nun kuraĝas rakonti, kion ili dum jaroj kaŝis. Ankaŭ la sinteno de la katolikaj instancoj iom post iom ŝanĝiĝis: kvankam unue ili precipe provis silentigi atestantojn kaj kaŝi faktojn, ili – sub la premo de la publika opinio – nun rekonas faktojn.

Kreskas ĉe ili la konscio, ke necesas rekonu kulpon, atenti la viktimojn, eventuale provi kompensi ilin, puni kulpulojn aŭ almenaŭ malhelpi recidivon. Sed unuflanke la ekleziaj respondeculoj preferas solvi ĉion interne, dum aliflanke multaj viktimoj ne plu povas apelacii al juĝaj instancoj pro preskripto. Ankaŭ tiuj bezonas kompreneman orelon.

Pritrakti plendojn

Tial la belga eklezio starigis en 1997 komisionon por pritrakti tiajn plendojn. Ĝi devas asisti viktimojn kaj montri la vojon al helpo ĉe kompetentuloj. Ĝi agis sendepende de la eklezio, sed tamen devas informi la episkopojn kaj avizi ilin pri necesaj paŝoj.

La unua prezidantino demisiis – senluziigite – ĉar laŭ ŝi la episkopoj apenaŭ atentis ŝiajn raportojn. Peter Adriaenssens [adriānsens], porinfana psikiatro, transprenis la taskon antaŭ unu jaro.

En la 22a de aprilo la tre populara episkopo de Bruĝo, Roger Vangheluwe [vanĥéliŭe], demisiis, kiam konatiĝis, ke li dum jaroj sekse misuzis sian nevon. Evidente tio vekis konsterniĝon. La komisiono Adriaenssens pritraktis 30 dosierojn antaŭ tiu evento. Poste, en kelkaj semajnoj, tiu nombro kreskis ĝis 475.

Anstataŭi justicon

Adriaenssens konsciis pri la delikateco de la rilatoj inter la komisiono kaj la justico. Evidente li ne povas anstataŭi la belgan justicon. Aliflanke li menciis, ke pluraj plendantoj eksplicite esprimis, ke ili nepre deziras diskretecon. Ili ne volas riski, ke oni voku ilin por atesti en publika proceso.

Li do faris interkonsenton kun la federacia prokuroraro: la komisiono diskrete pritraktos plendojn, laŭeble helpos viktimojn, precipe kiam temas pri preskriptiĝintaj kazoj, sed transdonos dosierojn, kiuj bezonas tion al la juĝistoj. Krome li instigis viktimojn mem direkti sin al la justico.

La supre menciita agado de la brusela esplorjuĝisto provokis protestopluvon. Vatikano furiozis. Iuj komunikiloj parolis eĉ pri loĝia komploto kontraŭ la eklezio. La belgaj episkopoj protestis,

sed iom pli modere. Sinjoro Adriaenssens estis precipe ŝokita, ĉar nun la dosieroj de tiuj, kiuj nepre deziris diskretecon, tamen estas ĉe la juraj instancoj, kiujn ili ŝajne ne tre fidas.

Alvoki informantojn

Evidente ankaŭ la juraj instancoj ne rajtas malkaŝi la enhavon, sed, kiam sekvas proceso, oni tamen povas alvoki informantojn por publike atesti. „Tiu homoj do plian fojon spertas perfidon. Kiel eblas restarigi fidan rilaton kun tiuj viktimoj?“, diris Adriaenssens. La tuta komisiono sekve demisiis. Eĉ la ministro pri justico demandis sin, ĉu la agado proporcii kun la supozataj akuzoj.

Intertempe la kaŭzo de tia drasta iniciato restas sekreta. Iuj komunikiloj kondamnas la agadon; aliaj pravigas ĝin. Adriaenssens jam diskoniĝis, ke en 50 plendoj oni mencias la emeritan ĉefepiskopon Danneels, ĉefe ĉar li neglektis informojn pri misuzoj. Rifuzi helpo al persono nepre helpobezona estas punebla. Do eble eĉ Danneels povus esti kulpigita.

Prijuĝi dosierojn

Iuj opinias, ke la komisiono Adriaenssens – kvankam sendependa, tamen eklezia – ne povus objekte prijuĝi, kiujn dosierojn oni transdonu al la juraj instancoj. Krome la belga eklezio, institucio, kiu kulpas pri 5000 taksitaj seksaj mispaŝoj, ĝis nun ne spertis juran persekuton. Surprizas, ke la brusela prokuroro ekiniciatis la esploron, ne informinte la federacian prokuroraron, kiu tamen faris interkonsenton kun Adriaenssens pri kunlaboro. Jure tio eblas, sed tio tamen malkaŝas internajn tensiojn. Jam post 10 tagoj la federacia prokuroro ordonis esploron, ĉu la ago de la brusela prokuroro estas laŭregula kaj pravigebla. Tia esploro okazas ege malofte kaj neniam antaŭe tiom rapide.

Oni do pli kaj pli havas la impreson, ke temas pri interna milito inter prokuroroj. Oni povas demandi sin, ĉu tio efektive helpas al la viktimoj de seksaj misuzoj.

Ivo DURWAELE

SPIONADO

Malsekretaj sekretoj

Antaŭ mondaj amaskomunikiloj kaj mirigitaj televidspektantoj, ĝuste kiel en la tempo de la tiel nomata malvarma milito, okazis interŝanĝo de sekretaj agentoj inter Usono kaj Rusio. Unu detalo altiras la atenton: la menciita epoko ne plu ekzistas, sed la loko restas la sama – Vieno.

Tiu ĉi urbo havas longan historion de spiona agado. En ĝi estas ĉio necesa, por ke agent-interŝanĝo okazu absolute glate. Kaj do, 20 jarojn post la falo de la tiel nomata fera kurteno, spionoj kaj rezidantoj fartas tre bone en la ĉefurbo de la neŭtrala Aŭstrio.

Informantoj

„Ĉiuj sekretaj servoj, kiuj agadis ĉi tie dum la malvarma milito, ĉeestas ankaŭ nun”, diras la historiisto Siegfried Beer, gvidanto de la Aŭstra Cen-

tro pri Spionado, Propagando kaj Sekurecaj Esploroj. Laŭ la donitaĵoj, pri kiuj disponas Beer, en Vieno nuntempe aktivas inter 2000 kaj 3000 sekretaj agentoj kaj informantoj. Multaj el ili okupiĝas pri ekonomia aŭ teknologia spionado, ĉar politika spionado perdis sian gravecon.

Aŭstrio estis centro de internacia spionado ekde la fino de 19a jarcento, kiam ĉi tien venis homoj el ĉiuj partoj de la granda monarkio Aŭstrio-Hungario. Ties disfalo kaj ankaŭ la politika malordo en meza Eŭropo post la unua mondmilito kaŭzis, ke ĉiam pli da sekretaj servoj lokis sian rezidejon en Vieno.

Post la dua mondmilito oni dividis la urbon en kvar zonojn, en kiuj la sekretaj servoj de la okupantaj landoj konkuren- cis en la kolektado de sekretaj informoj. Ĉekape de la agenta agado tiutempe es-

tis la usona CIA kaj sovetunia KGB.

Sabotaĵoj

Kiam en 1955 Aŭstrio akceptis neŭtralecon, la aliancanoj retiriĝis kaj revokis el Vieno multajn sekretajn agentojn. Aliflanke restis multaj. La spionoj plu interŝanĝis informojn kaj monon kaj uzis Vienon kiel bazon por plani sekretajn operaciojn, sabotaĵojn kaj eĉ murdojn.

La streĉita epoko de la malvarma milito malaperis, sed la sekretaj agentoj kiel antaŭe plu ĝuas la gastamon de la aŭstra ĉefurbo. Tamen, laŭ Siegfried Beer, se la sekretaj agentoj ne spionas kontraŭ Aŭstrio, tiuj neniun aŭstron povas maltrankviligi.

Evgeni GEORGIEV

Foto: Agent-interŝanĝo. Usona kaj rusa aviadiloj ĉe la viena flughaveno Schwechat.



TAGBLATT.CH

EGALECO

Nova socio sen malnovaj stereotipoj

En junio estas inaŭgurita en la litova ĉefurbo Vilnius instituto pri seksa egaleco. Temas pri la unua agentejo de Eŭropa Unio (EU) kun sidejo en balta lando.

La estrino de la instituto, Virginija Langbakk, diris, ke ŝi esperas kunlabori pri sociajn aktivulojn, kiuj engaĝiĝas pri problemoj de egaleco. „Ni esperas krei novan socion, en kiu forestos malnovaj stereotipoj pri viroj kaj virinoj”, ŝi diris.

Perforto

La prezidanto de Litovio, Dalia Grybauskaitė, kiu partoprenis la inaŭguran konferencon, rimarkis, ke statistikoj pravas, ke salajroj pro la sama laboro ne estas egalaj por viroj kaj virinoj. Cetere, ŝi atentigis pri la problemoj de perforto ene de familioj.

La instituto celas lukti kontraŭ diskriminacio pro sekso kaj veki tiurilate la konscion de EU-civitanoj. Krome ĝi



LAST

kolektos, analizos kaj disvastigos informojn pri egaleco kaj superrigardos la integriton de seksa politiko en la leĝaron kaj de la unio kaj de naciaj registaroj.

LAST

Foto: La estrino de la instituto pri seksa egaleco, Virginija Langbakk, revas pri nova socio sen malnovaj stereotipoj.

Insulo malaperinta



MALEDIVES TOURISM

En la golfo de Bengalio apud Barato kaj Bangladeŝo troveblis insulo 3,5 km longa kaj 3,0 km larĝa. Nomis ĝin Barato Nova Moore kaj Bangladeŝo Suda Talpatti. Jam de 30 jaroj disputis ambaŭ ŝtatoj pri suvereneco de la insulo.

Nun, tamen, superfluas disputado. Pro la altiĝo de la marnivelo la insulo simple ne plu ekzistas. Tion konfirmis Sugata Hazra, profesoro pri marstudoj ĉe la universitato de Kalkato, surbaze de satelitaj fotoj.

Ankaŭ aliaj landoj estas tiel minacataj. Maldivoj, insularo en Hinda Oceano, malaperos sub la maro, se la mondo nenion faros. Pasintjare la prezidanto de Maldivoj, Mohamed Nasheed, portante skafandron, kunvenis kun sia kabineto kvin metrojn sub la maro, por atentigi pri la problemo.

Marnivelo

Avertis la prezidanto: „Se Maldivoj ne ekzistus, neniu povus plu ekzisti en la mondo.” En Maldivoj homoj vivas nur 2,1 metrojn super la marnivelo, kiu ĉiujare kreskas.

En Nepalo, kie homoj multiĝas kaj arbaroj malmultiĝas, kunvenis ministroj pasintjare en Kalapather (5250 m alta). Ili timas, ke glaciĝeroj en la tiea montaro degelas, kio kaŭzos katastrofojn en ilia lando.

Nepras do pripensi, kio fareblos por mildigi la efikojn de monda varmiĝo. Eble oni malpli uzu akvon, kaj serĉu energion el renovigeblaj fontoj.

Navin Lal SHRESTHA/pg

OPINIO

Revo realigita

PAUL GUBBINS



Ne aparte notindas la inaŭguro de lerneja komputilejo. Verŝajne ĉiu instruejo, ĉu unugrada, ĉu duagrada, disponas pri aroj da plej modernaj elektronikaj ekipaĵoj, por ke studentoj primajstru teĥnologiojn neprajn por travivi en la nuna mondo. Almenaŭ, tamen, en evoluintaj, okcidentaj aŭ okcidentspecaj landoj.

En multaj aliaj landoj regas situacio tute malsama. Gravas aliaj prioritatoj ol komputiloj, ol Interreto, guglado kaj virtualaj mondoj: gravas aktuala, reala mondo de malriĉo kaj malsano, de akvokaj manĝaĵo-manko, de socia, ekonomia kaj politika necerteco.

Des pli, do, malgraŭ ĉio ĉi, rimar-

kindas la malfermo de nova komputilejo ĉe la kampara lernejo Isaac Newton, kelkajn kilometrojn for de la urbo Masaka, en Ugando, kaj situanta iom subekvatore ĉ. tri aŭthorojn for de la uganda ĉefurbo Kampala.

Familia enspezo

La lernejo Isaac Newton havas proksimume 110 duagradajn gestudentojn, el kiuj ĉ. 25 loĝas internule ĉe la lernejo. Studento, aŭ ties gepatroj, pagas trimestre ekvivalenton de 22 eŭroj; internulo pagas 60. Tio signifas foje grandan proporcion de familia enspezo, tamen gepatroj komprenas, ke gravas instruado. Instruisto, parenteze, lukras hore malpli ol unu eŭron, kio apenaŭ

permesas decan vivtenadon.

La lernejo dependas ne nur de lokaj enspezoj, sed ankaŭ de subvencioj de eksterlando. Isaac Newton bonŝancas, ĉar ĝi estas unu el tri duagradaj lernejoj en Ugando subtenataj de britaj kaj alilandaj humanistoj. Iasence la lernejoj unikas: en Ugando, lando almenaŭ supraj tre konfesiokreda, kie eĉ la taksi-busetoj portas admonojn religiajn, multaj lernejoj, se ne ŝtataj, apartenas al eklezioj, ĉu protestantaj, ĉu katolikaj, ĉu islamaj.

Humanismo

La devizo de la lernejo trafte esprimas bazan principon de humanismo: rezonu, ne kredu. Ankaŭ la nomo de la lernejo ne



PAUL GUBBINS



hazardas. Ĝi spegulas la racian, sciencan fundamenton, sur kiu Peter Kisirinya, instruisto pri natursciencoj, fondis la lernejon en 2004: Neŭtono (1642-1727) estis la angla fizikisto, kiu elpensis leĝojn pri gravito. Krome, grava diferenco inter la humanismaj lernejoj kaj aliaj konsistas en tio, ke ili estas toleremaj kaj do malfermaj al ĉiuj, ne konsiderante religion, kredon aŭ nekredon.

Humanistoj ne disponas, kiel la eklezioj, pri riĉaĵoj amasigataj dum miloj da jaroj. La financa helpo, kiun povas liveri la bonfara organizaĵo *Uganda Humanist Schools Trust* (Uganda Humanisma Lernejo-Fondaĵo), estas limigita, ĉar ĝi devenas de la poŝoj de unuopaj humanistoj. Tamen unu el la plej imponaj atingiĝoj de la fondaĵo estas la nova komputilejo ĉe Isaac Newton.

Sunpaneloj

Dum vilaĝanoj surloke bakis la brikojn, ebenigis la terenon, konstruis murojn, ĉarpentis tegmento-trabojn kaj formis tablojn kaj taburetojn, la fondaĵo pagis ne nur la komputilojn sed ankaŭ la sunpanelojn por provizi ekranojn kaj printilojn per elektro: en la kamparo ankoraŭ mankas elektro (cetere, ĉe la lernejo, akvo). Kaj do, kiam ĉio pretis, la tuta komunumo, inkluzive de gravuloj, kiaj politikistoj kaj la polica ĉefo, estas invitataj al la lernejo por kunfesti la malfermon de la komputilejo.

Temis pri tago da paroladoj, promesoj pri la estonteco de la lernejo, kaj granda subĉiele preparita festmanĝaĵo servata al pli ol 100 gastoj. Fine ĉiuj, plenŝtipe vizitintaj kaj ekzamenintaj la komputilejon, deklaris sin kontentaj kaj fieraj pri „sia” moderna kaj progresema lernejo.



Certe, kelkaj iom nervoziĝis, timante la influon de interreta pornografio kaj aliaj fremdaj malbonaĵoj, sed ĝenerale ĉiuj aplaudis la novan ekipaĵon.

Juna generacio

S-ro Kisirinya aparte ĝojis, vidante la komputilejon. „Realigis mia revo”, li diris. „Mi deziris la komputilojn por antaŭenigi la edukadon kaj la bonfarton de la juna generacio por akordiĝi kun la nuna kreskanta mondo.”

La fondaĵo-prezidanto, brita universitata instruisto kaj ekonomikisto Steve Hurd, diris, ke la komputilejo allogos novajn lernejarojn al Isaac Newton. „Tiamaniere la lernejo fariĝos finance iom pli sendependa”, li diris. „Aliflanke pli da lernejaroj signifos, ke necesos novaj dormejoj por internuloj kaj ankaŭ verŝajne pliaj necesejoj. Ne ĉesos nia laboro.”

Lastaj vortoj al abituriento Edward Mugamber, kiu priraportis la malfermon en la lerneja gazeto. Frontpaĝe li skribis: „Gestudentoj, kiuj tuttage ridetis kaj jubilis, diris: Vivu la lernejo Isaac Newton! Vivu humanismo!” Kaj tiel estis.

Detaloj – en la angla lingvo – pri la



Uganda Humanisma Lernejo-fondaĵo legeblas ĉe www.ugandahumanistschools-trust.org.

Paul GUBBINS

1. La fondinto de la lernejo, Peter Kisirinya, kaj la prezidanto de la Uganda Humanisma Lernejo-fondaĵo, Steve Hurd, lanĉas la novan komputilejon.
2. Gravuloj kaj gastoj atendas ekster la nova komputilejo la solenan inaŭguron.
3. Vilaĝanoj preparas subĉiele enorman festbufedon por celebri la malfermon de la komputilejon.
4. Lernejaroj konatiĝas kun la nova teknologio.
5. La lernejo Isaac Newton fieras pri sia humanisma principaro.

JAPANIO

Malplenaj kapoj, plenaj korpoj

Skuiĝis lastatempe pro diversaj skandaloj la mondo de sumoo, la japana tradicia lukto rigardata kiel nacia sporto. En 2007 mortis juna luktisto pro tiel nomata favora traktado, nome perfortado; en 2009 estis maldungitaj du rusaj luktistoj suspektataj pro haŝiŝo-fumado; kaj en 2010 la plej forta *Jokozuma*-luktisto Asaŝoorjuu estis eksigita pro perforto al konato dum drinkado.

Cetere restas la problemoj pri basbala vetado, kiam luktistoj kaj iliaj gvidantoj vetas je matĉoj inter basbalteamoj. Por ekvilibri la teamojn, spertulo donas handikapajn poentojn al unu el la teamoj. Tio estas profesia afero, sed administrata de mafianoj. Tiuj ricevas 10 % da makleraĵo. Tial veti por basbal-matĉo signifas helpi kontraŭleĝajn mafianojn.

Turniro

La Sumoo-Asocio malkaŝis, ke 65 luktistoj vetis je basbal-matĉoj. La asocio maldungis unu luktiston kaj lian gvidantan majstron pro multjara vetado. Ĝi malpermesis al pliaj 12 partopreni en turniro. Cetere la asocio-prezidanto estas provizore anstataŭigita. La ministroj pri edukado kaj scienco, kiu prizorgas la asocion, ne taksas ĝin kapabla.

Kun la kondiĉo, ke la asocio severe punu la koncernajn luktistojn kaj reformu sin, la ministroj permesis, ke okazu grava turniro en Nagajo. Tamen malgraŭ tio la duonŝtata elsend-stacio NHK decidis ne priraporti la matĉojn. Krome la pokalon por la ĉampiono nome de la imperiestro oni ne donos. Kompanioj, kiuj



DAVIDSTEDMAN

donacis premiojn, retiriĝis, timante, ke sumoo-reklamado prezentos malbonan impreson.

Sklaviĝi

Verdire sumoo ne plu allogas junulojn. Basbalo, piedpilko kaj golfo pli altiras: profesiuloj en sportoj tiaj perlaboras pli da mono. Krome, por fariĝi sumoo-luktisto, oni eniras tiel nomatan ĉambron kaj trejniĝas sub la severa gvido de la majstro. Tio signifas sklaviĝi por pli altaj ranguloj.

Sukcesaj luktistoj malmultas. Nur 68 luktistoj en la rangoj de *Makuuĉi*

kaj *Juurjoo* el 721 ricevas salajron. La aliaj luktadas sen salajro kaj, kiam ili eksigas en la aĝo de ĉirkaŭ 35 jaroj, al ili restas nur malplena kapo kaj plena korpo, kune kun kapabloj senutilaj en la socio.

Povas esti, ke sumoo fariĝos pli internacia, allogante pli da eksterlandaj junuloj, ĉefe el malriĉaj landoj. Verŝajne ĝi perdos sian „sanktecon” kiel tradicia sporto. Same kiel ĵudo internaciĝis kaj fariĝis ero en la Olimpikoj, sekvas ankaŭ sumoo. Tio estos neevitebla por la estonteco de la sporto.

Hori Jasuo

Vojo de la Nacio



BARDHYL SELIM

La Vojo de la Nacio trionigos la vojaĝon inter la albana ĉefurbo kaj la norda landlimo.

La montara tereno de Albanio malfaciligas veturadon. Aldone la komunisma reĝimo ĉiam konstruis laŭ strategiaj pli ol ekonomiaj celoj. Tial precipe la nordo, najbare al Kosovo, suferis pro vojoj sen tuneloj kaj necesaj pontoj. Por atingi la landlimon per buso, nur 200 km for de la ĉefurbo Tirano, necesis naŭ horoj. Tial la albana registaro antaŭ ses jaroj decidis konstrui novan vojon pli mallongan kaj havantan centojn da pontoj kaj tunelon ĉirkaŭ ses kilometrojn longa, kiu ebligas atingi la landlimon ene de tri horoj.

La vojo estas preskaŭ preta. Jam de unu jaro pli ol miliono da homoj kaj dekmiloj da aŭtoj kaj kamionoj uzas ĝin por atingi ne nur la nordon de Albanio sed ankaŭ Kosovon, Makedonion kaj Serbion.

Komence de 2010 ankaŭ la registaro de Kosovo decidis konstrui similan ŝoseon, kiu estos ligita al tiu en Albanio. La nova vojo atingos Serbion ĉe la limpunkto Merdar.

Bardhyl SELIMI

SERBIO

Ponto al pliaj kontraktoj



DIMITRIJE JANIĆ

Desegnaĵo pri la nova tiel nomata amikeco-ponto en Serbio: ĝi tamen servos komercajn pli ol amikecajn celojn.

Ponton konstruos ĉinoj en la serba ĉefurbo Beogrado. La ponto ligos du partojn de la urbo, Zemuno kaj Borĉa [borĉa]. Ĉeestis la solenan metadon de fundamenta ŝtono multnombra ĉina delegacio kaj membroj de la serba registaro.

La ponto estos konstruita per kredito de 217,4 milionoj da dolaroj de la ĉina Eskim-banko, kun jara interezo dum 15 jaroj de 3 %. La laboroj komenciĝos en aprilo 2011. La ponto estos 1,5 km longa kaj samtempe estos konstruitaj 21 km da elirejaj kaj enirejaj ŝoseoj.

Amikeco

Politikistoj diris, ke temas pri ponto de amikeco. Tamen pli gravas mono ol amikeco. Per la ponto volas la ĉinoj prezenti sin al Eŭropa Unio kaj aliaj eŭropaj landoj. Post la Olimpiaj Ludoj en Ĉinio restas multe da fortaj konstru-kompanioj, kiuj serĉas novajn merkatojn.

Serbio, kun ok milionoj da loĝantoj, ne enhavas multe da intereso por Ĉinio. Tamen ĝiaj rilatoj kun Rusio, Belorusio, Turkio kaj landoj de Eŭropa Unio allogas. Temas tiam ne pri ok sed pri okcent milionoj da konsumantoj. Tio signifas, ke la ponto servos ambaŭflankajn interesojn.

Dimitrije JANIĆ

KONGO (D.R.)

Administrado pri turismo estas kripla

La turisma administrado de Kongo ne havas propran oficejon. Ĉiutage la funkciuloj iras al sia laborejo, sed pro manko de lokoj ili devas labori ekstere. Kian laboron ili povas fari en tia hontiga situacio?

Plia problemo estas, ke la homoj ne sufiĉe enspezas por plenumi siajn taskojn. Ili ricevas nur pli-malpli 4000 kongajn frankojn (proksimume 4 eŭrojn) kaj 8000 frankojn kiel premion monate, sed la premioj, kiujn la ŝtato promesas, ne alvenas ĉe ili.

Necesas stimuli la turisman sektoron, sed kie komenci? Ekzemple mankas busoj por transporti la turistojn kaj la

funkciuloj ofte ne havas sufiĉe da profesiaj scioj. La ministro nur atentis pri la naturaj kaj ekologiaj sektoroj, forgesante ke la turisma sektoro evoluu kune.

Aliaj landoj disvolviĝas pro sia turisma sektoro, malgraŭ la lingvaj kaj aliaj baroj. La kongaj geestroj adiaŭu siajn malbonajn kondutmanierojn por ke la lando antaŭeniru.

Nelly MASSEMI

AFRIKO

Afrika komuna valuto

Ekde 2002 en la plimulto de la landoj de Eŭropa Unio estas uzata komuna valuto: la eŭro. Alia komuna valuto jam delonge funkcias en okcident- kaj centrafrikaj landoj: la afrika franko aŭ CFA-franko.

La CFA-franko estas uzata en eksaj francaj kolonioj kaj kelkaj aliaj afrikaj landoj. Formale ekzistas du valutoj, la okcidentafrika franko kaj la centrafrika aŭ ekvatorafrika franko, sed praktike ambaŭ havas la saman valoron. Unu CFA-franko valoras proksimume 0,0015 eŭrojn.

Ĉar ĝi estas ligita al la eŭro (antaŭe al la franca franko), ĝi havas stabilan

kurzon. Ĝin envias loĝantoj de najbaraj landoj kun ĥaosa financa sistemo. Tamen ankaŭ estas kritikantoj. Pro la ligo al eŭropa valuto iuj konsideras ĝin novkoloniisma. Multaj ekonomikistoj opinias, ke ĝia kurzo estas tro alta kaj malfaciligas eksporton.

RR


Vidu ankaŭ

eo.wikipedia.org/wiki/Afrika_franko

AFRIKO

Stabila valuto gravas

Kameruno, Centr-Afriko, Ĉado, Kongo Brazavila, Gvineo Ekvatora kaj Gabono havas komunan valuton: la CFA-frankon. La Demokratia Respubliko Kongo estas la sola granda lando en centra Afriko, kiu havas sian propran valuton: la kongan frankon.




La efikoj de stabila monunuo je la ekonomia vivo estas okulfra-paj. Se oni komparas Kongon kun ekzemple Kameruno, konstateblas ke en Kameruno homoj bone manĝas, ĉar tie la manĝaĵoj malmultekostas, kaj ke la transporto bone funkcias, ĉar estas bonaj vojoj.

Nelly MASEMI

Kontribuojn por la rubriko Ekonomio de Monato kunlaborantoj sendu al ekonomio@monato.net.

Nekontentiga bilanco



Titolpaĝo de la jara raporto 2010 pri la Jarmilaj Evoluigaj Celoj de UN.

En la jara raporto 2010 pri la Jarmilaj Evoluigaj Celoj (2000-2015), kiu estis prezentita en Vieno, oni notas, ke la klimatsanĝiĝo kaj ekonomia krizo grave malfaciligis ĝian plenumon. Estas prezentitaj iuj sukcesoj, tamen oni mencias ankaŭ la kaŭzojn por la manko de kontentiga progreso.

Al la Jarmilaj Celoj apartenas ankaŭ la certigo de naturmedia daŭripovo, por kiu kiel indikilojn oni konsideras la senarbarigon, la ellasojn de karbona dioksido kaj konservon de biodiverseco.

Senarbarigo maltrankvilige alta

La tutmonda senarbarigo – ĉefe la transformiĝo de tropikaj arbaroj al agrikulturaj terenoj – malpliigas, tamen ĝia rolo restas signifa. Dum la lasta jardeko ĉirkaŭ 13 milionoj da hektaroj da arboj jare estis utiligataj por aliaj celoj aŭ neniigitaj pro naturkialoj kompare kun 16 milionoj da hektaroj jare dum la 90aj jaroj.

Ambiciaj programoj por estigo de novaj arbaroj en kelkaj ŝtatoj, kombinita kun natura plivastigo de arbaroj en aliaj regionoj, aldonas pli ol 7 milionojn da hektaroj jare. Rezulte de tio la neniigo de arbaraj areoj en la periodo 2000-2010 estis malpliigita ĝis 5,2 milionoj da hektaroj jare, dum en la periodo 1990-2000 ili malgrandiĝis je 8,3 milionoj da hektaroj jare.

En suda Ameriko kaj Afriko estas plej multaj neniigitaj arbaroj – sub 4 kaj respektive 3,4 milionoj da hektaroj jare en la periodo 2000-2010. Tamen en la evoluantaj regionoj kaj Aŭstralio okazas granda neniigo de arbaroj pro forta

FOIPA/4

Kvankam certa progreso en la konservado de biodiverseco estas atingita, tamen ties rompo daŭras obstine.

Proksimume 17 000 specioj de plantoj kaj bestoj estas minacataj je malapero tutmonde.



sekeco kaj incendioj post la jaro 2000. Azio, aliflanke, registras pliigon je 2,2 milionoj da hektaroj jare dum la lasta jardeko, ĉefe pro vastskalaj rearbarigaj programoj en Ĉinio, Barato kaj Vjetnamio.

Tiuj tri ŝtatoj pligrandigas la arbarajn areojn je proksimume 4 milionoj da hektaroj jare dum la lastaj kvin jaroj. Tamen la rapida transformiĝo de arbaraj areoj al terenoj por aliaj celoj daŭras en multaj ŝtatoj en tiu regiono.

Decidiga reago urĝe bezonata

Dum 2007 la tutmondaj ellasoj de karbona dioksido kreskis denove, atingante 30 miliardojn da tunoj, do pliigo je 3,2 procentoj rilate al la antaŭa jaro.

Tio prezentas pligrandiĝon je 35 procentoj rilate al la nivelo de 1990. Je persono la karbondioksidadaj ellasoj estas plej altaj en la evoluantaj regionoj

noĵ – proksimume ĉirkaŭ po 12 tunoj da karbona dioksido persone jare dum 2007, kompare kun po 3 tunoj averaĝe persone en la disvolviĝantaj kaj 0,9 tunoj en la sub-sahara Afriko (la plej malalta regiona valoro). Post 1990 la ellasoj malpliigis je pli ol 26 procentoj en la evoluantaj regionoj kaj je 11 procentoj en la disvolviĝantaj regionoj.

La atendataj donitaĵoj por 2008 eble montras malgrandan ŝanĝon de la tendenco. La parto de kresko de la ellasoj de karbona dioksido en tutmonda skalo verŝajne iom malpliigis en 2008 kiel rezulto de la tutmonda financa krizo. Sed laŭ iuj prijuĝoj la malaltiĝo estos mal-long-tempa.

Oni prognozas, ke la tutmondaj ellasoj baldaŭ restarigos sian kreskon kaj la karbona dioksido superos la nivelon de 1990 je 65 procentoj ĝis 2020. Tiu kresko estas nehaltigebla kaj plu pligrandigas la riskon je profundaj kaj mal-

favoraj efikoj al la tutmonda klimato.

Celo ĝis 2010 maltrafita

Kvankam certa progreso en la konservado de biodiverseco estas atingita, tamen ties rompo daŭras obstine. Proksimume 17 000 specioj de plantoj kaj bestoj estas minacataj je malapero tutmonde.

Bazite sur kurantaj tendencoj, la malapero de specioj daŭros dum la tuta kuranta jarcento, kun kreskanta risko je dramecaj ŝanĝoj de ekologiaj sistemoj kaj malpliigo de profitoj por la socio.

Malgraŭ la kreskanta investado de monrimedoj en la planadon kaj agadon por la konservado de biodiverseco, pri la ĉefaj influfaktoroj de ĝia rompo – inkludantaj altajn partojn de konsumado, perdon de la habitato, invadantajn speciojn, poluon kaj klimatsanĝiĝon – oni ĉiam ankoraŭ ne sufiĉe okupiĝas.

Evgeni GEORGIEV



Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be
 Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio),
 14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Turmentoj

Ne. Mi neniel povas kompreni, kiel tio okazis. Mi estas jam ne juna, tute ne malsaĝa viro, sed enamiĝis kiel infano. Neniel mi povis pensi, ke ordinara inklino rigardi al ŝi povas poiomete kreskante atingi tiun profundan senton.

Ŝi estas proksimume duoble pli juna ol mi, aŭ inverse, kio estas tute la sama, mi estas duoble pli aĝa. Ni laboras en la sama oficejo, sed mi en la tria etaĝo, kaj ŝi en la dua, en diversaj fakoj, kaj tute malofte ni kunpuŝiĝas en koridoroj dum niaj labortagoj. Multe pli daŭre ni vidas unu la alian dum ne tiom oftaj komunaj kunvenoj, bezonataj fakte nur de niaj ĉefoj por eventuale „meti birdeton”, ke

tiuj okazis. Fakte ankaŭ la esprimo „ni vidas unu la alian” estas la erara. Mi ja rigardas kaj vidas ŝin, sed ŝi eble eĉ ne atentis, ke mi rigardas al ŝi, ke mi entute ekzistas.

Ja ĝuste dum tiuj kunvenoj mi kurtimis rigardi al ŝi. Nia oficejo estas ne multthoma; en ĝi laboras eble kvindeko

Kiom aĝa ŝi estas?

Laŭ ŝia aspekto mi supozas proksimume 23 ĝis 26. Ĉiam nete vestite en belaj vestaĵoj, ĉarma hararanĝo, ŝi konstante dum tiuj kunvenoj estis leganta iujn librojn.

da oficistoj. Se kompari kvanton de viroj kaj inoj, virinoj iom pli multas, kiel en preskaŭ ĉiuj similaj projektaj entreprenoj.

Vizitante la unuan kunvenon post mia dungiĝo, mi ĉirkaŭrigardis ties partoprenantojn. Duono el ili estis aŭ jam emeritoj, aŭ proksimis al tiu aĝo. Ankaŭ la aliaj ne aspektis junaj. Nur kelkaj ĉeestantoj estis „freŝe bakitaj specialistoj” ĵus aŭ antaŭ nelonge finintaj iun superlernejon.

Mi eksidis pli proksime al lastaj vicoj de la halo, de kie preskaŭ ĉiuj estis bone vidataj de mi, kiel oni diras „dorse”. Ŝi kutimis sidi flanke de meza vico, kaj mi facile povis observi ŝin, sen ke ŝi tion vidu.

Kiom aĝa ŝi estas? Laŭ ŝia aspekto mi supozas proksimume 23 ĝis 26. Ĉiam nete vestite en belaj vestaĵoj, ĉarma hararanĝo, ŝi konstante dum tiuj kunvenoj estis leganta iujn librojn. Evidente, la legado estis ŝia ŝatokupo. De malproksimo mi ne povis vidi kiukarakterajn librojn ŝi havis por la legado, ĉu tio estis ordinaraĵo detektivoj, ĉu ia serioza literaturo. Ankaŭ mi ŝatis esti kun ia libro dum tiuj kunvenoj, sed plene ne atenti la parolojn de niaj ĉefoj mi ne emis. Kial mi atentis ĝuste ŝin? Ja estis ankaŭ aliaj virinoj. Sed laŭ mia opinio pli bela ol ŝi estis neniu.

Pasis kelkaj monatoj, kaj tiu mia nevola kutimo rigardi al ŝi iĝis kvazaŭ vera kutimo, sen kiu mi jam ne plu povis esti. Eĉ dum iu kunveno, kiam ŝi pro



ALEX E. PROIMOS



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

iu kaŭzo forestis, mi sentis min jam iom nekonvene. Kaj jam tiam mi komprenis, ke mi vane permesis al mi tiun kutton. Mi komencis rimarki, ke ne nur dum tiuj niaj kunvenoj mi pensis pri ŝi, sed ankaŭ dum laboro kaj eĉ hejme. Tio estis jam tro. Kion mi pensis, pri kio revis? Ja povus okazi nenio. Jam pro la aĝdiferenco. Mi plej verŝajne ne povus eĉ fari veran konatiĝon, ne povus trovi komencajn vortojn, komencajn frazojn bezonatajn por la konatiĝo. Eble mi sen praktiko jam forgesis, kiel oni tion faras. Kion mi povus al ŝi proponi? Al mi tute ne plaĉis aktualaj versioj de la konatiĝo.

- Ĉu ne ŝatus vi kaŝtrinki kun mi hodiaŭ vespere?

- Ĉu vi hodiaŭ liberas por kune vespermanĝi?

- Ĉu ne emas vi hodiaŭ vespere promeni kun mi tra la parko?

Aŭ io simila. Fakte ĉiuj ĉi versioj estas tute normalaj. Sed por iun el ili efektivigi necesus komence ekhavi pli proksiman kontakton en la oficejo. Kaj krome. Se hazarde la cirkonstanco proksimigus min al simila propono, mi

absolute ne estas certa, ke la respondo estus pozitiva. Simple reeĉe mi povus ekaŭdi:

„Pardonu, sed hodiaŭ mi estas ege okupita. Mia filo (filino) nun iom malsanas”, tio estus verŝajne la plej mola rifuzo.

„Mia edzo neniam permesas vespermanĝi kun nekonataj aŭ malbone konataj viroj”, tio rifuzo aldone montrus, ke ŝi ne estas libera.

Ŝi povus ankaŭ perrigarde respondi negative, alivorte rigardi al mi tiel, kvazaŭ ŝi dirus, „Onklo, pri kio vi pensas? Rigardu al vi, kaj komparu vin kun mi.” Kaj mi ĉiam timis ricevi negativan respondon al mia propono.

Ankaŭ la alia varianto. Se hazarde al mia propono ŝi respondus pozitive, ĉu mi sciuss, kiel nun junularo kondutas dum similaj rendevuoj? Eble, ĉio okazas tute malsame kompare kun similaj momentoj antaŭ dekoj da jaroj.

Do, kion mi faru? Ĉu mi petu ies konsilojn? Aŭ restas nur lasi ĉion samstate. Kaj daŭrigi observi ŝin de-flanke, daŭrigi turmentigi.

Dmitrij CIBULEVSKI



JOYSEPH

Enigmo: 3 en 1

Bonvolu sendi vian solvon cifere antaŭ la unua de decembro al enigmoj@monato.be aŭ al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio.

Sukceson!

1. iama R + adverbo + monkesto = klarigas
2. mamulo parenca al rato R + dombesto kiu ĉasas la unuan parton R + trinkaĵo R = speco de alkoholaĵo R
3. amata R + atuta disko de koncerna ludo R + malviro = genro de kruciferoj
4. aersimila fluidaĵo R + adverbo + distingiga vorto R = spertulo pri delikataj manĝaĵoj R
5. lina teksaĵo R + peceto + materia kvanto R = inklinas al akceptado
6. krude manĝi R + pezo de ĉiuspeca envolvo R + sufikso = Petro de Smedt R
7. cifero + ne mia + ne plu teni R + vulgaraĉas
8. prepozicio + intermonta vastaĵo R + valormetala = malmerita
9. interpunkcia signo R + asocio R + liptuŝo R = sciigis
10. prepozicio + atingi difinitan lokon R + via (senceremonie) = monhelpan
11. neakomponata R + pritempa indiko R + loko = kazino
12. kortbirdo R + instrumento + iu diservo R = luksan tendon
13. adverbo + natria klorido R + trinkaĵo R = rapide dekliniĝas
14. eŭropano R + inklini + scii R = skriban publikan diskutadon
15. prepozicio + prepozicio antaŭhistoria + deziri R = memstare R
16. prefikso + nia planedo R + vorteto apud vortoj demandaj = sekretajn
17. meti iun en akvon R + adverbo + amfibio vertebrula R = rilatan al posedanto de financa firmao
18. monarko R + teksaĵo R + oferi R = Belgion ekzemple
19. gimnastikilo R + movi ŝipon per plata ligna ilo R + abstraktaĵo kiel re-ala ekzistaĵo R = sedimento R
20. prepozicio + malmola haŭto R + pikanta insekto R = adicii R
21. prepozicio + organo R + pronomo = geologia formacio
22. iri R + rilate al kioma tempo post la naskiĝo + mallarĝa rivereto R = veturantoj per ekz. fervojo
23. membro + prefikso + nedifinan pronomon = eksternormaĵon

R = radikvorto

JPVDD

1									
2									
3									
4									
5									
6									
7									
8									
9									
10									
11									
12									
13									
14									
15									
16									
17									
18									
19									
20									
21									
22									
23									

Perversa pedagogio - drameca didaktiko

Jen konciza unuakta drameto kun nur tri roluloj. La unua – iu ŝajne milda erudicia profesoro kun signifa reputacio, kiu akceptas lernantojn unuope en sia hejmo, la dua – lia dommastrino kaj la tria – juna studentino, kiu fariĝas nova lernanto ĉe la profesoro.

La komencaj paĝoj de la verko donas enscenigajn instrukciojn kaj gvidon por la aktoroj kiel prezenti kaj modifi la personecojn de la roluloj dum la dramo. Sekve, se vi legas la verkon en libra formo, vi jam havas ideon pri la verŝajne atendebla misiro de eventoj. Spertante la verkon kiel spektanto en teatro, tiuj informoj fariĝos (en lerta surscenigo!) nur laŭgrade evidentaj al vi dum la disvolviĝo

de la drameto. Se vi konas la verkiston, vi tamen havas antaŭsuspektojn pri la atendeblaj bizaraĵoj!

Oni scivolas, ĉu celo de la aŭtoro estis fakte moki iujn troigojn kaj kritikindaĵojn de la tiama instruado aŭ simple krei teatraĵeton plena je absurdaĵoj, logikaj kontraŭdiroj kaj kalemburoj. Ni supozu, ke li efektive volis kritiki la instruadon – jen instruisto, kiu plene ignoras la bezonojn aŭ dirojn de la lernanto, kiu turnas la nociojn de motivigo al lerndeziro sur sian kapon, mortigante anstataŭ spronante tion; kiu kreas malfacilaĵojn, kie ili ne devus ekzisti por aspektigi la lernadon apenaŭ sekvebla mistika procezo kaj diras nekompreneblaĵojn, kiuj

levas harfendaĵojn ĝis la nivelo de vivnecesaj lernaĵoj.

La servistino envenas de tempo al tempo, dirante zorgigajn avertojn, kiuj pruviĝas ĉiam pli trafaj. La kulmino okazas, kiam la profesoro – kiel bone dresita Cseh-instruisto – prenas fizikan objekton por klarigi sian tezon. Tiu objekto fakte estas minacilo, kies precizan tipon ni ne malkaŝos, kiel same la teatraĵan finon. Ege defia tradukotasko – lerte plenumita, kune kun adaptetoj por konvenigi la verkon por esperantista publiko. Se la verko abunde legiĝos, ni devas timi pri la varbusukceso ĉe estontaj kursoj de ILEI.

Stefan MacGILL

Eŭgeno Ionesco (1909-1994): *La leciono (1950)*. El la franca tradukis Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Eld. La KancerKliniko, Thaumiers, 2010. 50 paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 6,89 eŭroj + afranko.



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj rakontoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyi.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ afranko.


Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Kiel aspektas miraklo

La libro estas stranga. La strangaĵoj en ĝi estas kelkaj. Sed la unua, kaj ĉefa, estas la ĝenro. Fakte, preskaŭ ĉiuj „noveloj” el la prezentitaj 18 estas laŭ la unua vido fabeloj (la du lastaj – primo-vadaj satiraĵoj). Nu, fabelo estas ja ĝenro estiminda: sufiĉas rememori, ke laŭorda konatiĝo kun Esperanto komenciĝas de la fabelo („Unu vidvino havis du filinojn...” por kompreni ĝian gravecon por nia literaturo. La fabeloj estas popularaj ĉe la infanoj, sed ne nur: ni nur menciis la furoron de „La mastro de l’ ringoj” libro-kaj kino-forme, kaj vi komprenos, ke la ĝenro estas ankaŭ serioza. Samtempe, originale verkita fabeloj en Esperanta literaturo ne tro multas, kaj tial necesas tuj saluti la novan fabelkolekton.

Sed ne ĉio tiom simplas. Ja la fabeloj ne estas tre kutimaj, eĉ se iuspeca influo de la klasikaj verkoj, kiel de Andersen, evidente sentebblas. Parto de la fabeloj (se ne ĉiuj) aspektas iom strange, kaj ne ĉiam klaras, kion la aŭtoro volis diri. Tamen, post medito pri la strangaĵoj, mi faris la jenan konkludon: la ĉefa celo de la aŭtoro estis esplori la fenomenon de miraklo. Hm ... Sed ja ĉiuj fabeloj uzas miraklon, kaj en tiu senco esploras ĝin, ĉu ne? Kompreneble – por instrui, distraj, alegoriaj kaj pluraj aliaj celoj. Sed Westover faras alion: li rigardas la imagitajn situaciojn de la ekzisto de la mirakloj apud ni kaj sekvas la homajn reagojn al ili.

Tiaj estas la fabeloj *Marvirinstrato*, *Pigopago*, *Fiŝhepatoleo*, *Meduzet’* kaj kelkaj aliaj. La esploraĵoj en ili demandoj estas, ekzemple, tiaj: „Ĉu ino, simila al marvirino, vere estas tio, kaj ĉu marvirinoj vere vivas apud ni?”; „Ĉu la patrino ĝojos, se la filino ricevos dona-



con de feino?”; „Kio pli bonas – la fidela pajloĉapelo aŭ mirakla rimedo, perme-santa paŝi sur akvosurfaco?”; „Ĉu oni akceptas trankvile la ekziston de racia meduzeto apud knabino?” kaj simile. La respondoj estas diversaj kaj paradoksaj – kaj ĝuste tiuj fabeloj konsistigas la plej bonan parton de la libro. Unu fabelo – *Nia bestoĝardeno* – iom tro rekte provas respondi la ĉefan demandon: „Kio ĝenerale estas miraklo?” La respondo, kiun donas la aŭtoro, estas iom banala, sed prezentita elegante. Proksimas al ĝi laŭ la tasko kaj solvo *El la taglibro pri la okcidenta vojaĝo*.

Kelkaj aliaj fabeloj estas iom pli tradiciaj (kvankam ankaŭ ili enhavas paradoksojn) – ili traktas neantaŭvideblajn homajn dezirojn. Tio estas, ekzemple,

Orfiŝeto kaj glacia monto kaj *Labirintoj*. Min ili impresis iom malpli – eble ĝuste pro la troa tradicieco, sed tio estas afero de la gusto.

Iom aparte staras tri noveloj-fabeloj, inspiritaj de la esperanta kulturo. Unu el ili estas stranga knaba historio, tre usoneca stile, inspirita de „enigma” zamenhofa frazo pri „Tri ruĝaj knabinoj”. La afero devenas, fakte, de certa mistraduko, sed ne tio gravas ĉi-okaze: ni vidas, kiel tuja imago pri la knabinoj naskis ĉe la aŭtoro grandan knabpsikologian historion ... La historio estas strangeta (jes ja, strangeco ĝenerale estas trajto de la stilo de Westover!), sed atentokapta, kaj ĝuste ĝi pruvis al mi tion, ke la aŭtoro, kvankam komencanta, ja havas estimindan verkistan talenton.

La dua esperant-tema novelo – *Estimata Vi* – „verdece” traktas la ĉefan temon pri mirakloj: „Ĉu esperantisto ĝojos, se ricevos donace tutan Esperanto-urbon, sed senhoman?” La solvo estas proksimume sama, kiel en la fabelo *Fiŝhepatoleo*. Kaj la fina novelo *Antaŭparolo al la plena verkaro de Yvette Swithmoor* estas sprita parodio pri la Esperanto-kulturo ĝenerale, montranta profundan konatecon de la aŭtoro kun nia literaturo, kritiko, moroj ktp. Min la gaje-galaj rikanoj de Westover pacigis kun ĉiuj ne tro gravaj mankoj de la kolekto!

Kaj jen la lasta strangaĵo de la libro, absolute nekutima (dume) en la mondo: la aŭtoro kaj la eldonejo rajtigas ĉiun homon senpage legi la libron en la reto (kie ĝi troviĝas plene), elŝuti ĝin kaj uzi laŭplaĉe! Tiaspeca donaco estas io tute nova ... Malgraŭ tio, ke la homoj, kutimaj legi de l’ ekrano, ne havas stimulon aĉeti la paperan eldonon, espereble, sufiĉos en la mondo tiuj, kiuj preferas foliumi la paperajn librojn ... Do, ili aĉetu – kaj la avaruloj legu senpage!

Nikolao GUDSKOV

Tim Westover: *Marvirinstrato. Originalaj noveloj en Esperanto*. Eld. Literaturo.net, Lawrensville, 2009. 211 paĝoj broŝurita. ISBN 1-4392-3634-8.

Prezo ĉe FEL: 10,70 eŭroj + aŭfranko.

Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Lidia Zamenhof

La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amoureux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mond-militoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentre. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumigas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.



Eldonjaro: 2009

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 430 paĝoj,
ISBN: 978-90-77066-38-6;
prezo ĉe FEL: 24 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 14,40 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei libroliston laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO

12 sous la Ville, 55210 CREUE (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

**enciklopedieto
kun informoj kiel
telefoni el kaj al
eksterlando**

PINK SHERBET PHOTOGRAPHY

La Jaro 2011

via poŝamiko dum la tuta jaro 2011

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezojn en p.4)

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli